



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA DE T

N-ro 7
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata

Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo

Dum la tagoj 19a ĝis 22a de Junio 1965 okazis en Oslo la 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso, sub la alta protektado de la urbestro de Oslo, s.ro Brynjulf Bull. Kongresejo estis la universitata ĉefkonstruaĵo en la urbocentro.

Al la kongreso aliĝis proks. 230 personoj, kompreneble precipe svedoj kaj norvegoj, danoj kaj finnoj, sed ankaŭ bonvenaj gastoj alilandaj, tiel ke regis vere internacia atmosfero kun reprezentantoj el entute 13 landoj.

Je nia alveno sabaton matene regis febra aktiveco en la kongresa oficejo, kie la L.K.K. (s.ino Astrid Mansrud, s.roj John Berggreen (pr.), Kjell Gustavsen, Otto Koren, Alfred Skyberg, C. Støp-Bowitz) kaj ĝiaj helpantoj (poŝtofiĉejo kun aparta poŝtstampo, librovendejo, loĝiga kaj ekskursiva servoj k.t.p.) perfekte funkciis.

Sabaton posttagmeze okazis estrarkunvenoj kaj ĝenerala kunveno de la norvega Eldonejo Esperanto A/S, kaj samtempe ekskurso al la Vigelandparko kaj la nova, moderna Munch-

muzeo, sub gvidado de Rolf Bugge-Paulsen.

Vespere oni kolektiĝis por Solena Malfermo kaj Interkonatiĝa Vespere. Bonvenigis John Berggreen, prez. de la L.K.K. Kongresprezidanto elektiĝis C. Støp-Bowitz, kiu formale malfermis la kongreson. Laŭ lia propono oni aprobis ke temas pri la 2a Nordlanda Kongreso (la 1-a «Skandinavia» okazis en Göteborg en 1918!). Inter aliaj programeroj Gunleik Bergrud ludis nordlandajn kvodlibetojn, salutis la kongreson eksterlandaj kongresanoj, kaj oni vidis filmon «Bonvenon al Oslo». Prof. Lapenna dankis pro la jam farita laboro pri la kolektado de subskriboj por U.N. kaj direktis fortan alvokon pri intensa plua kolektado. Ernfrid Malmgren raportis pri la Parlamenta Kampanjo por Internacia Lingvo. Por tiu eksterordinare grava iniciato la landaj asocioj kaj Komitatoj de U.E.A. ricevos per speciala cirkulero detalajn informojn pri la estonta kunlaboro. — Estis

(daŭr. p. 77)

POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

Red.: H. Fridén

HINDUJO. (El «Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo» de J. Scherer). (Post Bali ni faras saltegon al Hindujo, kie nun ties du novaj naciaj ŝtatoj, Hindujo kaj Pakistano, estas en plena milito).

Hindujo! Kiu ne jam revis kaj sonĝis pri Hindujo? La lando mistera kaj romantika. La lando de luksaj palacoj, marmoraj moskeoj kaj riĉaj temploj. La lando de tigroj, de kobroj kaj aliaj serpentoj. La hejmo de mario kaj ĥolero.

Jes, estas mistero en Hindujo. Al 300 000 000 hindoj estas mistero, kial ili ne povas manĝi sufiĉe. Jes, estas romantiko en Hindujo, sed ankaŭ terura mizero. Ekster la muroj de la luksaj palacoj regas mizera malriĉeco. Sed la mizero estas malofte vidata de la turistoj, kiuj veturas tra la lando en luksaj vagonaroj. Mi decidis vidi ne nur la marmoron, sen ankaŭ la mizeron.

La homoj ĝenerale pensas pri Hindujo kiel lando, kie brilegas juveloj en kolorriĉaj procesioj, kiel lando laŭvorte kovrita per marmoro kaj abunde provizita per imponaj maharaĝoj rajdantaj sur ornamitaj elefantoj. Sed por ĉiu tegolo sur pentrita tegmento estas mil kadukaj domaĉoj. Por ĉiu nobelo estas dek mil malriĉuloj. Mallonge, Hindujo estas tre varmega peco de la mondo, kie 300 000 000 homoj preĝas al milionoj da diversaj dioj, kie jare 23 000 homoj (kaj 100 000 dombestoj) mortas pro atakoj de tigroj kaj serpentoj. Sed en Usono multe pli da homoj mortas jare, laŭproporcie, pro aŭtomobil-akcidentoj.

Vortoj:
revi — dagdrømme

sonĝi — drømme under søvnen
mizero — elendighet
ekster — utenfor
vagon-aro — tog
decidi — beslutte
koloro-riĉa — fargerik
laŭ-vorte — etter ordet, bokstavelig
kovrita — dekket
proviziita — forsynt
abunde — ødselt, overdådig
tegolo — takstein
pentrita tegmento — malt tak
kaduka — falleferdig
nobelo — adelsmann
varmega — het
preĝi — be
jare — hvert år, årligårs
laŭ-proporcie — proporsjonalt, forholdsviss
akcidento — ulykke

Informoj de LKK por la 17a IFEF-Kongreso en Hamar

La monenhavo de la vitra porko estis 284,76 norvegaj kronoj. La plej proksima divenita n-ro estas A 4644. Bonvolu sendi la bileton al s.ro J. A. Kleven, Disen Allé 11, Hamar, en enskribita letero.

Por la kosto de la posedanto ni povos resendi jenajn trovitaĵojn:

Virina ombrelo kun arĝentsimila tenilo;

vira ombrelo, mallonga faldigebla; kelkaj gantoj.

La LKK en Hamar.

Nova adreso

Bonvolu noti, ke la ĉefredaktoro havas novan adreson:

Hulderveien 17 B, Sarpsborg.

Samtempe ni ripetas, ke informoj pri abonoj kaj novaj adresoj estu sendataj al la ekspedejo, kaj ne al la redaktoro!

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—

1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—

1/8 p. kr. 19,—

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna agado. La estraro de NEL memorigas ĉiujn klubojn kaj membrojn pri tio, ke nun ni ĉiuj devas fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en nia lando. Senescepte ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondon, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton publikigi nian gazetan kurson. — Vidu cetere la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por la kluboj. — Oktobro: La kluboj aranĝas kunvenon por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu inviton al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la tago de U. N. — Antaŭ la 15a la sekretario sendas al NEL (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 3a jar-kvarono (blankedo A10). La kas-

isto sendas al NEL (kaj al la distrikto) kotizon kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La 51a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Budapeŝto somere 1966. Detaloj sekvos.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Oni okazigis 1 estrarkunvenon kaj elsendis 1 cirkuleron al la kluboj. Oni sukcesis ekhavi novan oficejon, pli grandan, kaj alvokis al la membroj pri ekonomia helpo por teni ĝin. Oni diskutis norvegan eldonon de Dok. C.E.D./7. La 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso okazis en Oslo, kaj la landa kunveno de NEL reprezentigis en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S per 243 voĉoj. Oni elektis C. Støp-Bowitz reprezentanto de N.E.L. al la 50a U.K. en Tokio, R. Bugge-Paulsen reprezentis la registaron.

La subskribkolektado. Ni varme petas ĉiujn membrojn streĉi ĉiujn fortojn por kolekti laŭeble multajn unuopajn kaj kolektivajn subskribojn. Petu blankedojn de NEL.

Glumarko. Uzu la glumarkojn de UEA pri la Jaro de Internacia Kunlaboro. Folio de 10 markoj kostas kr. 0,80 + afranko. Aĉeteblaj de NEL.

Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la 24an de oktobro. En ĉiu klubo okazu almenaŭ mallonga paroladeto aŭ prelego pri la signifo de U.N. aŭ pri iu aspekto de ĝia laboro. Informojn por tia prelego oni povas trovi en la libro «Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo» aŭ en artikoloj

en la junia kaj aŭgusta n.roj de la revuo «Esperanto». La ĉefa afero estas ke en ĉiuj kluboj oni memorigu la Tagon de U.N. la 24an de oktobro aŭ iun tagon proksiman al tiu dato. El tiuj kunvenoj oni bonvolu sendi al la ĝenerala sekretario de U.N. (s.ro U Thant, United Nations, New York (N. Y.), Usono) gratulan telegramon aŭ mallongan leteron en Esperanto, sed bonvolu elekti laŭeble plej internaciajn esprimojn, tiel ke ili estu tuj kompreneblaj. Estas gravege ke la sekretariato de U.N. ricevu centojn da leteroj kaj telegramoj okaze de la datreveno el ĉiuj partoj de la mondo.

Raporto pri la landa kunveno de N.E.L. aperos en la venonta numero.

La Liga Estraro.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. Dum majo — junio 1965 elementan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo Tore Haug, Jørun F. Selstad, Frank Aasheim, en Trondhejmo Kristin Midtby, Dagfinn Rian, Marit Sofie Træen.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de decembro 1965. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementajn ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Stavanger, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1a de novembro.* Personoj, kiuj faros la ekzamenon

ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete! — Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por la sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtĝirokonto 100.34.

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktasoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktasoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. — Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vere, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de NEL.
C. Støp-Bowitz
prezidanto

Várnai Zseni:

La infano ne dormas ...

- Panjo, kio estas la milito?
- Soldato soldaton pafas, per bajoneto atakas, poste ĉiuj mortas.
- Panjo, ĉu ili ne doloron havas?
- Sed jes, kara! Entombigas la mortintojn en fosaĵon, por eterna dormrestado.
- Diru, panjo, kial ili pafas?
- Ĉar... malamas unu la alian, ĉar ne havas la senton amikan.
- Sed kial koleras ĉiuj?
- Tion mi ne scias... Dormu!

El hungara tradukis:
Szalay Sándor

Nordlanda Esperanto- Kongreso en Oslo

(daŭr. de p. 73)

okazo mendi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, sed pro tro malmultaj kelnerinoj la servado daŭris tiel longe, ke ne plu restis tempo por la danco.

Dimanĉon matene: komuna fotografiĝo antaŭ la kongresejo, en pluva vetero. Poste okazis la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio kaj Norvega Esperantista Ligo. Mi menciuj nur ke ambaŭ asocioj reelektis siajn prezidantojn, Jan Strønne kaj C. Støp-Bowitz.

Posttagmeze okazis jarkunsido de la sveda Eldona Societo Esperanto, kaj laborkunsidoj de la tri kongresaj sekcioj: «Esperanto en la lernejojn», «Esperanto en la gazetarono» kaj «Esperanto inter la junulojn». En la unua, kiun mi partoprenis, aperis interesaj raportoj kaj fruktodonaj diskutoj.

Festkunveno en la Aŭlo de la Universitato okazis dimanĉe vespere sub gvidado de Astrid Mansrud. Prologon prezentis lektoro Johan Hammond Rosbach. Tre plaĉe kantis la blinduloj Erling Stordahl k. Gunnar Engedahl. Lertege aktoris niaj gesamideanoj Stein Winge en la rolo de Peer Gynt kaj Astri Jacobsen kiel patrino Åse. Poste Astri Jacobsen, post morto kiel maljuna, sulkvizaĝa patrino Åse en la dramo de Ibsen, surprizis reviviĝante kiel juna, vigla kantistino de operetaj melodioj. Virtuoze majstris la Hardanger-violonon samideano Norman Birkeli. Streĉa atento kaj tondra aplaŭdo akompanis la recitadon de nia blinda samideano Halvdan Kartarud: «Beethoven ludas por la blinda knabino». La ĉefpunkto de la programo de la festkunveno estis la festparolado de Prof. Lapenna pri «La homaj rajtoj kaj la lingva diskrimin-

acio». Pruvante la ekziston de objektiva lingva diskriminacio li donis la nerefoneblan bazan argumenton por la bezono de internacia lingvo por la atingo de vere internacia kunlaborado.

La lundo estis dediĉita al tuttaga ekskurso. Ni ĝuis la mirindan fjordan panoramon ĉirkaŭ Holmenkollen kaj bone lunciis en la restoracio de la Popolkultura Muzeo en Bygdø. Neforgesebla estis la impresa Diservo en la malnova fostopreĝejo el la 12a jarcento kun prediko de pastro Hans Amund Rosbach. Sekvis vizitoj al la domoj de la vikingaj ŝipoj (perfektajn klarigojn en Esperanto donis la profesia deĵoranto Th. Engebretsen), de la Kon-Tiki-floso kaj de la polus-esplora ŝipo «Fram», uzita de Fridtjof Nansen kaj Roald Amundsen.

Ŝipetoj reportis nin al la urbocentro ĝustatempe por la oficiala akcepto en la Urbodomo. Ĉe la enira pordo al la festsalono atendis nin urbestro Brynjulf Bull, kiu manpremis ĉiun kongresanon. Poste li direktis en Esperanto koran bonvenon de la komunumo Oslo, kaj regalis nin laŭ la tradicia Oslo-gastamo.

La lasta tago, mardo, estis dediĉita al komuna diskutkunveno. Ni aŭdis kvar mallongajn enkondukojn pri «La taskoj de Nordlanda Esperanto-Komitato» (S. Raumavirta), «La ĝenerala kunlaboro inter niaj landaj asocioj» (Jan Strønne), «Ekonomiaj problemoj» (J. Berggreen), «Informa laboro» (L. Anjer). Oni libere kaj amike diskutis la komunajn demandojn. Plejparte la diskutoj turniĝis ĉirkaŭ la demando pri komuna internorda presorgano. Post tre edifa kaj amuza parpromenado de la dana kaj sveda asociaj prezidantoj el la diskuto elformiĝis pli konkreta propono pri eventuala eldono de provnumero de komuna norda revuo.

Vespere: Ferma festeno. Komuna

manĝado, bonegaj manĝaĵoj. Forlasante la tablon C. Støp-Bowitz dankis al ĉiuj kaj formale fermis la kongreson. Dum la resto de la vespero oni babiladis, dancis kaj ĝuis diversajn distraĵojn (filmo, skeĉo, kantado solista). Impresa interludo estis la serioza ordena promocio de *Pro Merito*, la ordeno de NEL: Komandoroj de la 1a klaso fariĝis s.ino Aagot Sletterød, R. Bugge-Paulsen, Komandoro de la 2a klaso Olav Thormodsen, Kavaliroj de la 2a klaso f.ino Lif Berg, s.ino Eva Støp-Bowitz, s.roj Sigvald Ege, Karl Ekhaugen, Nils Utne.

Sendube la kongreso estis granda sukceso, kaj gazetoj kaj radio kontentige raportis. Niajn elkorajn dankojn meritas la L.K.K. kaj ĉiuj ĝiaj helpintoj, sed antaŭ ĉiuj ĝia energia prezidanto, John Berggreen, la animo de la tuta aranĝo.

Mian raporton mi fermas per la teksto de la

Kongresa Rezolucio :

La 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso, okazinta en la Universitato de Oslo 19.—22. Junio 1965, kiun partoprenas reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj de la 5 Nordaj Landoj, unanime aprobas la sekvantan decidon de la Lerneja Sekcio de la kongreso:

1. La sekcio konstatas ke en la lastaj jaroj pluraj landoj akceptis leĝojn ebligantajn la instruadon de la internacia lingvo Esperanto en universitatoj kaj lernejoj, kaj ke rezulte konsiderinde vastiĝis la instruado de tiu lingvo en la lernejoj de 32 landoj.

2. Sendependaj enketoj faritaj en diversaj landoj establis ke la instruado de Esperanto en lernejoj donas tre kontentigajn pedagogiajn rezultojn, kiuj manifestiĝas en

- a) rapida akiro de pasiva kaj aktiva scio de tiu lingvo,
- b) helpo al pli bona kompreno de la

propra lingvo kaj faciligo de lernado de fremdaj lingvoj,

c) kontribuo al lernado de aliaj studobjektoj, precipe de geografio kaj historio,

ĉ) ebligo de senperaj internaciaj kontaktoj kaj paralela evoluigo de internacia kompreniĝo konforme al la celoj de U.N., precipe klare formulitaj okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

3. La sekcio tial rekomendas al la kompetentaj edukaj instancoj de la Nordaj Landoj kuraĝigi la instruadon de la internacia lingvo en la lernejoj.

Partopreninto.

50-a Universala Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1965

Post longaj preparoj — kaj duboj — la 23an de Julio ses genorvegoj en-vagoniĝis por Stokholmo, kie ni aliĝis al grupo de 5 danoj kaj 12 svedoj en la flughaveno Arlanda. La vojaĝoficejo RESO provizis al ni bonan, sed ne-esperantistan karavanestron, Rune Nilsson. Ni flugis unue al Helsinki, poste al Moskvo, kie ni, post longega aŭtobustransporto al alia flughaveno, eniris grandan rusan «turbo-prop»-maŝinon. Per ĝi ni flugis en 8½ horoj trans duonon de Rusujo kaj tutan Siberion ĝis Ĥabarovsk, kies varmega vetero ne impresis tre «siberie». Rondveturo en la urbo; vagonare ĝis Naĥodka; longedaŭraj formalaĵoj; fine ni enŝipiĝis en moderna ŝipego «Khabarovsk», kiu dum pli ol du tagoj kaj noktoj portis nin trans spegule trankvilaj Japana kaj Pacifika Maroj ĝis Jokohamo. Fine aŭtobuse ĝis Tokio, kie ni ekloĝiĝis en luksega «Tokyo Prince Hotel», la 28. de Julio.

La unua impresio pri Tokio estis humida varmego, sed ĉiuj modernaj

domoj havis malvarmigan instalaĵon. La dua impresio: eksterordinare afablaj, helpemaj homoj. Entute la japanaj esperantistoj ĉiam kolektiĝis ĉirkaŭ la alilandanoj, arde dezirante ekzerci la lingvon en interparolado kun ni.

Pri niaj kongresoj oni ofte uzas la vorton *perfekta*. Neniam ĝi pli taŭgis ol en Tokio. La L.K.K. evidente decidis ke ĉio iru glate, kaj efektive ĉio iris absolute glate. La ambicio de niaj japanaj geamikoj tiurilate komplete plenumiĝis. Sed ili havis multajn bonajn helpantojn: el proks. 1700 kongresanoj proks. la duono estis japanoj.

Kongresejo estis du apudaj konstruaĵoj: Nookyoo Bilu kaj Nikkei Hall. Interkonatiĝa Vespero en granda salono plenplena de malnovaj kaj novaj geamikoj. Grupo da junaj japanaj studentoj tie kaptis min por diskuti, pri kio ajn, nur diskuti en Esperanto, aŭdi kaj ekzercadi la lingvon.

Inaŭguro laŭ la tradicia programo, en Kultura Domo en la Ueno-parko. Prezidis s.ro Holmes, honora prezidanto de U.E.A., ĉar la prezidanto, prof. Lapenna, ne partoprenis la kongreson. En la nomo de la Norvega Registaro salutis R. Bugge-Paulsen, por N.E.L. C. Støp-Bowitz. Inter la salutantoj iuj orientanoj ne povis deteni sin de politikumado, al kio poste la Komitato de UEA kompreneble devis reagi. La festparoladon elokvente faris Carlo Minnaja.

Vespere en la sama ejo okazis Japana Vespero, prezentado de japanaj muziko kaj danco, por ni eŭropanoj forta impresio pri ekzotika beleco.

La Komitato de UEA okazigis nur 3 kunvenojn, ankaŭ la Komitatanoj ja deziris vidi iom de Japanujo. Oni traktis nur la laŭstatutajn, rutinajn demandojn kaj la reagon al la menciita rompo de la neŭtraleco. La kon-

greso havis 2 Laborajn Sekciojn: 1) Aspektoj de internacia kunlaborado, 2) La lingva problemo en la internaciaj ekonomiaj rilatoj. Pro koincidoj mi bedaŭrinde ne povis ĉeesti tiujn kunsidojn. La t. n. «Generalaj kunvenoj» de UEA jam degeneris al sen signifaj aroj da salutoj kaj raportetoj, kiujn oni povas legi aliloke, kaj mi ne volis malŝpari tempon por vizito de tiuj kunvenoj.

Aliflanke la Internacia Somera Universitato estis ĉefe dediĉita al natursciencaj temoj. El la 8 prelegantoj 5 estis japanoj. Ĉiuj prelegoj estis altnivelaj, kaj laŭ mia opinio pli interesaj ol dum iu alia kongreso. Aparte ĉarma estis la prelego (kun filmo) de prof. N. Oka pri «Intelektu de orangutango».

Mencii ĉiujn kunvenojn kompreneble mi ne povas. Sed mi deziras mencii ke la Akademio okazigis du kunsidojn (ĉeestis 6 akademianoj) kaj i. a. rekomendis ke la Akademio rezignu nun fari decidon por unu el la du partoprenantoj kaj kontraŭ la alia.

En la Teatraj Vesperoj la pola «Teatro Populara» prezentis «Kataki signifas Malamiko» de S. Wincelberg. Bonege ludis la du aktoroj; temis pri japana kaj usona soldatoj izolitaj sur insulo dum la lasta milito. Ilia fina amikiĝo eble justigas la prezenton de tiu teatraĵo dum tiu ĉi kongreso. — Sed persone mi preferus ion iom pli gajan.

Oficiala Akcepto ĉe la urbestro de la 11-miliona urbego Tokio estis aparta travivaĵo por la invititoj. Unue promenado en tipe japana ĝardeno kun la tradicia lagejo, poste japanstila regalo, salutparolado de la urbestro, dankparolado de s.ro Holmes. Tuj poste oni veturis al la Oficiala Bankedo en alia urboparto. Denove promenado en parko, poste japanstila

manĝado. Kaj post la manĝo: Bonan nokton! Ĉiuj aranĝoj finiĝis plej malfrue je la 21a horo. Ŝajnas ke la japanoj emas frue enlitiĝi! (Tamen ili asertis ke ne!)

Al mi aparte plaĉis ke la Kongresa Balo okazis la *lastan* vesperon. Mirigis min tamen ke sufiĉe multaj kapablis danci en tia varmeĝo, kaj je usonstila orkestro, kiu evidente opiniis ke ju pli forte oni ludas, des pli bone. Konversacio estis ebla nur en la proksima ĝardeno.

La Ferma Kunsido kun akcepto de Kongresa Rezolucio (kies tekston vi certe trovos aliloke) estis ĉi-foje malpli melankolia ol kutime, ĉar la plimulto aliĝis ankaŭ al iuj postkongresaj aranĝoj. Jam dum la kongreso multaj faris vizitojn al la fama arturbo Nikko, aŭ al la naturmirindaĵoj de Hakone. Post la kongreso centoj iris al la oficiala postkongreso en la antaŭaj ĉefurboj japanaj, Kĵoto kaj Nara. Ankaŭ la Junulara Kongreso okazis en tiu regiono, en Ootu.

En Kĵoto oni evidente ne rajtas malsati post la 21a horo. Tamen finfine kelkaj postkongresanoj trovis etan japanan restoracion, kie ni povis iom kontentigi niajn materiajn bezonojn. Spaco mankas por priskribi ĉiujn belajojn, kiujn oni montris al ni. Sed kiam ni vagonare preterpasis la Monton Fuji survoje al Kĵoto, la veteraj dioj afable por momento fortiris la nebulan vualon, kiu ĉi-sezone ĉiam kovras la sanktan monton. Bedaŭrinde mi ne havis okazon partopreni la Oomoto-festivalon en Kameoka tuj post la Postkongreso. Laŭ raportoj tiu festivalo estis la plej bela el ĉiuj travivaĵoj en Japanujo.

Kelkaj norvegoj, anstataŭ ol iri al la Postkongreso, partoprenis 10-tagan rondvojaĝon en Japanujo, aranĝitan de RESO. Eble iu el ili aparte raportos pri tiu vojaĝo. Persone mi utiligis

la reston de la tempo por kontakto kun sciencistaj kolegoj, kaj vizito al la zoologie fama Sagami-golfo.

La 19an de Aŭgusto nia karavano denove kolektiĝis en Jokohamo kaj enŝipiĝis en «Khabarovsk». La hejmenvojaĝo sekvis la saman vojon. Adiaŭa vespero en Moskvo. De tie rekte al Stokholmo kaj Oslo, kiun ni atingis la 23. de Aŭgusto, post la plej bela kaj interesa vojaĝo imagebla.

Fine kelkaj japanaj impresoj. Oni imagus ke en lando, kie oni eĉ ne unu literon povas legi, oni sentus sin iom izolita. La ĝentileco, interesiĝo kaj kora helpemo de la japanoj komplete forigis tiajn sentojn. Ankaŭ la japanaj manĝaĵoj, kelkfoje iom strangaj por ni, sed ĝenerale bongustaj, tre konvenis, evidente ili estas adaptitaj al la klimato. Manĝi per la bastonetoj montriĝis malpli malfacile ol oni povus imagi, necesas nur ioma alkutimiĝo. Plurfoje mi manĝis krudajn fiŝojn, en la ŝipo holoturiojn, en ĥina restoracio, laŭ invito de Oomoto, mi provis 10-jarajn nigrajn ovojn, gaste ĉe d-ro Shinoda i. a. grandajn marajn gastropodojn, k.t.p. Ĉio estis bongusta kaj interesa sperto. Japanaj biero kaj sakeo estis unuarangaj. Tamen, sidado sur kusenoj sur la planko estis iom malfacila afero, sed dormado en japanstila surplanka lito tre agrabla. — Laŭdire japanoj grandparte scias la anglan lingvon. En okcidentstilaj hoteloj eble jes, sed cetere mi ne volonte vizitus Japanujon sen Esperanto. Efektive tre malmultaj japanoj, eĉ intelektuloj, kapablas paroli angle, kaj se jes, do kun kurioza japanusona akcento nekomprenebla. Mi kontaktis kun 9 sciencistoj, el kiuj unu kapablis paroli angle, kun 5 mi povis paroli en Esperanto, la 3 ceteraj malesperis post du frazoj anglaj, kaj ni transiris al Esperanto kun interpretisto.

C. Stöp-Bowitz.

RECENZOJ

Poemaro

Lajos Tárkony: SOIFO. Poemkollekto. Antaŭparolo de K. Kalocsay. Kovrilo Jan Schaap Jr. — Stafeto: Belliteratura Serio 23. J. Régulo, Eldonisto. — La Laguno, Kanariaj Insuloj 1964. Prezo: 2,40 us. dolaroj. (232 pĝ.)

Se homo el fremda planedo vidus la amason da poezio kiu ĝis nun estas eldonita en Esperanto, kaj precipe ĝian elstaran kvaliton, li certe juĝus ke Esperanto estas unu el la ĉeflingvoj de la tero, se ne la sola uzata. La kvalitoj de Esperanto certe devas esti elstaraj por instigi al tia aktiveco, kaj la arda kredo de ĝiaj adeptoj devas esti senkompara.

Lajos Tárkony naskiĝis en 1902 kaj debutis en Esperantujo antaŭ 40 jaroj sur la paĝoj de «Literatura Mondo», por kiu li en diversaj epokoj verkis recenzojn, eseojn kaj poemojn. Ankaŭ por «Hungara Vivo» li poste ŝutis el sia mirinda maniko.

Pri li deklaras William Auld en sia Antologio: «Lia poemaro estas unu el la ĉefaj libroj, kiuj ankoraŭ mankas al ni.» Aŭskultu jen al la mirinda sonharmonio de la poemo *Nordo*:

Ho Nordo! Fora, blanka vizio
de mia knaba fantazio!
Spirretene, plena de soifa scivolo
legante kun avida devoro
de literoj,
kun ruĝaj oreloj,
kun brilantaj okuloj
mi dronis en vojaĝpriskriboj dikaj,
en Jules Verne-romanoj arktikaj
kaj tra viaj nebulaj insuloj,
tra morne mutaj, frostaj fĵordoj,
preter la ŝip-embuskaj murdaj bordoj
preter enormaj naĝantaj glaci-rokoj,
balenoj vaporkornaj,
petola popolo de fokoj,

blankaj ursoj mornaj,
tra viaj glaciaj, dezertaj oceanoj,
tra la neĝkampoj senfundaj,
kie en ŝtormo baraktas karavanoj
de veturiloj hundaj,
mi sekvis la heroan spuron de l'
grandaj kapitanoj.
Kaj kun forto magneta
min altiris,
kun sorĉo sekreta
miajn vagantajn revojn inspiris
la mistervuala, sfinkse murda,
blanka rebuso:
la poluso . . .

Ne eblas en malgranda recenzo elĉerpe pritrakti ĉiujn flankojn de la genia poeto. «La miraklo de lia poezio kuŝas en tio, ke ĝi impresas samtempe delikate rafinita en la formo, nuance subtila en la esprimo, profunde sincera kaj tute korproksima en sia mesaĝo. Kiel mirinde Tárkony scias revoki fuĝajn impresojn per ŝajne tre simplaj rimedoj!» (Cit. el la kovrilo)

En la fino de la libro estas kelkaj komentoj kaj glosaro pri kelkaj neologismoj uzataj, la fakesprimoj de la poeto. Cetere mi montras al la bonega antaŭparolo de K. Kalocsay, kaj mi forte rekomendas la libron al poezi-amantoj per la vortoj, per kiuj la mezepoka skribisto subskribis la kopiitan manuskripton: «Legu, ĝi estas bela!»

HF.

Eĥo el praa tempo

Baldur Ragnarsson: Islandaj Praŭoĉoj. — 110-paĝa, bindita. Eldona Societo Esperanto, Malmö.

Al norvego estas vera plezuro legi ĉi tiujn sagaojn, kiuj per la traduko de Baldur Ragnarsson konservis sian forton, simplecon, simplan sagostilon. Kaj ŝajnas al mi, ke la tradukisto faris saĝan elekton dum li elektis la tri «novelojn» «Hrafinkel, pastro de Frey», «Torstein la Stangofrapito»

kaj «Audun kaj la urso». Kune ili donas impreson de praa tempo en Islando, pri internaj malfacilaĵoj kaj eksternaj interrilatoj. Kaj ĉiu estas tiel enhavoriĉa, ke oni legas ĝin kun sam intereso kiel modernan novelon. (Sed tiaj ja ne ĉiuj sagaoj estas.)

La aŭtoro en modele mallonga kaj klara enkonduko donas superrigardon kaj komprenon pri la islanda praa literaturo.

Plej malfacile digestebla estas la kvara parto: Völuspá. Per 57 strofoj kun aliteracioj la aŭguristino antaŭdiras la sorton de l' mondo. Kaj — dum la proza parto estas legebla sen vortaro kaj cerbumo, oni ĉi tie devone trovas neologismojn, kvankam nemultajn. La ligita, strikta formo de la versojn tion preskaŭ postulas.

Gratulon al la islandanoj, kaj al la esperantistaro.

HAR

Ne plu aktuala

La proleta revolucio kaj la reviziismo de Ĥruŝĉov. 62-paĝa broŝuro. Fremdlingva Eldonejo, Pekino.

Jen atingis nin la «oka komento pri la malferma letero de la Centra Komitato de KPSU», kie la ĉinaj komunistoj daŭre luktas kontraŭ la «reviziismo» de Ĥruŝĉov. Intertempe la Soveta Unio travivis ŝanĝon de gvidanto. Do — mia sola komento estas: «Ne plu aktuala».

Haro

Printempaj ekzamenoj

Elementa ekzameno 1965

DIKTAĴO

Maljuna fraŭlo en Toten / alvenis al la dancejo / sabate vespere. / Iom da brando / estis antaŭe konsumita, / kaj li sentis sin / tre bonfarta, / kaj volis danci. / La junaj fraŭlinoj / ne

estis tre bonvolaj, / tiel ke li ne tuj / ekhavis parulinon. / Tamen en angulo sidis / iu kun kaptuko, / kies plej bela juneco / jam forpasis. / Sed la fraŭlo decidigis / por malnovmoda valso, / kaj ne hezitis / prezenti sin. / Post pluraj rond-jetoj / la parulino petis, / ke li provu danci / ankaŭ en la kontraŭa direkto. / «Ĉu vi havas kapturiniĝon?» / demandis la fraŭlo. / Sed li ricevis la jenan / surprizan respondon: / «Ne, sed se vi daŭrigas / en la sama direkto, / vi elŝraŭbas / mian lignan kruron!»

Heziti = nøle
Ŝraŭbo = skruve

*

Elementa ekzameno 1965

TRADUKAĴO

Bergensereren og fisken.

En bergenser og en oslomann diskuterte *forretning* (1), og bergensereren sa at bergenserne var flinkere *forretningsfolk* enn oslofolkene.

«Dere spiser for lite fisk. Gi meg 15 kroner. Så skal jeg sende deg noe god fisk. Og da kommer du til å merke forskjell.»

Bergensereren fikk 15 kroner, og oslo-mannen fikk fisken. Da de seinere møtte hverandre, spurte bergensereren:

«Nå, merker du noen bedring på grunn av fisken?» «Fisken var god, men jeg merker ingen forandring,» svarte oslo-mannen. «Men jeg *syns* (2) det var mye å betale 15 kroner for en slik fisk.» «Der (3) ser du,» sa bergensereren, «hodet ditt har alt begynt å arbeide.»

- 1) *forretning* = komerco
- 2) «jeg *syns*» omskrives: «det synes meg»
- 3) bruk ordet «jen»

AKSEL SANDEMOSE:

Eksteren en la mallumo

Kiam unuan fojon mi forlasis Jante, tio ne havis karakteron de fuĝo. Eble mi tiam forvojaĝis nur por magriĝi en paco kaj reveni hejmen kiel iu Adoniŝo, kaj venki. Nur malgranda provo, post la trompo de l' konfirmacio, kaj mizere malsukcesa. Tiam estis tute decidite, ke mi revenu okazu sur la stratoj de Jante. Post kiam mi forestis por kelka tempo, mi revenu, estante aroganta sinjoro, kiu ion travivis.

Kiam mi la duan fojon foriris kaj fariĝis maristo, estis pli malproksima tiu penso, ke mi revenu kaj estu la heroo. Estis fuĝo, kaj mi devis for, por ke neniu vidu la maltaŭgan kaj neuzeblan Espen Arnakke. Pri venko en Jante aŭ aliloke entute mi ne plu kredis. Mi malvenkis kaj volis forkaŝi min.

La decido estis prenita subite, kaj ok taogjn poste mi vagis en alia urbo por dungigi, post io, kio ne propre laŭforme estis fuĝo dehejme, sed certe reale estis. Kaj mi daŭrigis malvenki, mi malvenkis senfine.

Mi neniam amis la maron. Eĉ ne plej ete. Tute kontraŭe. Sed mi ĉiam troviĝis meze en okazaĵoj, kie mi ne deziris esti.

Inter la plej mizera kaj malĝojiga kiun mi memoras, estas la atendado en la fremda urbo antaŭ ol mi havis laboron. Estis en marto kaj morde malvarme, sennega frosto, en la stratoj bloviĝis polvo kaj frostinta ĉevalfeko. Mi ĉirkaŭvagis frostanta kaj sentis min elpelita, tute kunfalinta. La fjordo estis plena de drivglacio, neniu velŝipo povis elveturi, kaj mi ne volis vojaĝi en vaporŝipo. Vaporŝipoj estis kvazaŭ tro distingitaj, en ili estis tiom da homoj, mi ne kuraĝis.

Reiri hejmen? Neniam! Iam poste mi iris en Kopenhago en norda malvarmo, havante nur surtuton, pantalonon kaj ŝuojn kaj sen loĝejo, sed tio tamen ne estis tiel malbona, kvankam certe estis multe pli malfacile, ĉar mi malsatis, ĝis mi ne povis pensi, kaj havis inflamacion en la postaĵo post revolvera kuglo. Jen historio, kiun mi eble volas rakonti. Tiam mi ankaŭ sidis en malliberejo dum kelkaj tagoj, Okcidenta Malliberejo ĝi nomiĝas, kaj estis eljetita sen akuzo. Mi cetere ne faris iun krimon, sed tiu flanko de la afero ŝajnis al mi ĉiam bagatelo, ĝuste kiel en la lernejo. Sed tamen tio ne estis tiel malbona kiel tiun fojon kiam mi iris elpuŝita kaj mizera, serĉante mian unuan dungigon — kun manĝo sur la tablo ĉiun tagon, varmaj vestoj kaj uzebla loĝejo. Nenio okazis. Mi iris sola kaj estis for de Jante. Umbiliko estis deŝirita kaj tio ĵus okazis. Mi malesperiĝis. Pri la forvojaĝo de Jante mi ankoraŭ povas sonĝi, estis ŝtormplena frosta mateno. Ĉe la ŝipo staris miaj gepatroj kaj Ejner. Li havis cigaredon pendanta en la buŝangulo kaj serĉis ŝirmon kontraŭ la akra vento post budo. Li pririgardis min kaj lasis sian okulon sekvi la ŝipon de antaŭo ĝis posto. Li skuis sian kapon. Li alkiutimiĝis ke pli maljunaj kaj pli junaj fratoj faras multajn strangajn aferojn. Ejner ne tion faradis. Ĉiam li memorigis al mi pri lumelfo. Ĉiam li estis pacema kaj levis la ŝultrojn pri la tuta familia kverelado. Ejner ne lasis sin impresi. Li akceptis konfidon ne reagante. Oni rifuzis al li konfidon, kaj li estis egale indiferenta, li povis simile al Nilfredo Kornikflugilo esti gajnita nek per bono nek malbono, li estis senŝanĝe afabla kaj gardis sin mem.

La ŝipo iris. Blovis kaj la ondoj rompis kontraŭ la drivglacio. Mi longe staris sur la ferdeko rigardante kontraŭ la bordojn ĉe Jante, kie kirliĝis la polvo kaj neĝo. Devus esti printempo, sed estis vintro, kaj mi vidis la tutan mondon antaŭ mi kvaŝaŭ krudan kaj sobran havenon kun kota drivglacio. Per la rigardo mi kroĉis min al la malaperanta tero, la altaĵoj kiuj kupoliĝis sub griza ĉielo, ĉiuj revoj falis flugilpafite en la frostkruda mateno, malsupren en glacialmalvarman mondon kiu neniam revidu la someron.

La hejmgregionoj malaperis, kaj mi estis frostante senhejma. Vi povas nomi min sentimentala aŭ kio vi volas, sed ankoraŭ hodiaŭ mi miras, ke mi transvivis la elŝiriĝon de Jante. Ĉar tion rekonis la knabo, kiu staris sur la ŝipo rigardante kontraŭ la malaperanta tero, ke ĉiuj esperoj kaj ĉiuj revoj, ĉiuj deziroj pri vivo kaj morto per umbilika kordo antaŭe estis ligitaj al lokoj, kiuj apartenis al lia infanaĵo. Nun li forestis de tiuj lokoj kaj estis venkita viro.

Nun Jante estas for kaj sinkinta en la maron, sed tiel oni amas tiujn lokojn, kie oni suferis. Kaj poste mi komencis ami Newfoundland, mian duan Fabelolandon, la kalvan insulon en la Atlantiko, ĉar tie la tragedio estis plenumita. La milito kaj malamo kaj la ligilo al niaj proksimaj estas eksplodema kerno en la trompa liriko de la naciismo kaj babilado pri la patrolando. Mi ne toleras belecon! Nur estas eble vivi purece surbaze de la malsentimentalaj kaj sobraj aferoj.

En speco de letargio mi ĉirkaŭiris en la fremda urbo. Mi havis malklaran ideon ke mi rondvagu rigardante ĝin, homoj certe tion faradis. Malkuraĝa mi sidis en mia loĝejo kaj nur tion pensis: Kion mi volas ĉi tie? Tiuj ĉi domoj kaj tiuj ĉi stratoj estas malvarmaj kaj fremdaj. Mi estis el-

pelita, metita ekster la vivon. Ĉi tie estis neniuj vizaĝoj, kiujn mi konis kaj vojaĝoj min ne tentis. La maro estis nur io tre vasta kaj tre dezerta.

Mia lasta iluzio falis pro tiu fakto, ke la korpon mi kunhavis. Estis tute diference sidi hejme lasante la revojn flugi. Nun mi malkovris ke la korpo kunsekvis. Oni ne flugas sur flugiloj de la aŭroro, sed movas la kruojn kaj havas pakaĵon da manĝo sub la brako. Kie estas la revo kiam ni ne plu estas sur la loko kie ĝi estis koncipita.

El la norvega tradukis
H. Fridén.

†

Didrik Mjølhus

Jus atingis nin la doloriga informo ke Didrik Mjølhus forpasis. Li mortis subite en Kristiansand, dum vojaĝo.

Didrik Mjølhus naskiĝis la 25an de novembro 1882. Li estis popollerneja instruisto, kaj esperantisto li estis de 1922. Dum la postaj jaroj li gvidis kursojn, verkis artikolojn, faris paroladojn. Li multe vojaĝis, partoprenis kongresojn kaj multajn landajn kunvenojn de N.E.L. Ankoraŭ, pli ol 80-jara, li gvidis Esperanto-kurson sur Karmøy. En 1937 li fondis Esperantoklubon «La Granda Ideo» en Skudeneshavn, kaj estis ĝia agema sekretario de la fondiĝo ĝis nun. Pro siaj laboroj li fariĝis Kavaliro de la 2a klaso de Pro Merito.

Didrik Mjølhus estis aminda homo, trankvila, sed ĉiam gaja. Li estis unu el la plej sinceraj kaj fidelaj esperantistoj en nia lando.

Ni deziras pacon al lia memoro.

Jens Schjerve 80-jara

La 7an de septembro Jens Schjerve fariĝis 80-jara. Nekredeble, sed vere. Jens Schjerve estas tre konata kiel karavanestro de Bennett, sed en Esperantujo li estas plej konata kiel kursgvidanto. Esperantisto de 1923, li gvidis sennombrajn kursojn en Norvegujo kaj eksterlando, kaj estas unu el la plej kapablaj instruistoj laŭ la Cseh-metodo. Li estas ankaŭ membro de la Ekzamena Komisiono de N.E.L. Postfeste koran gratulon!

Andreo Cseh 70-jara

Andreo Cseh fariĝis 70-jara la 12an de septembro. Li estas plej konata kiel la aŭtoro de la fama Cseh-metodo de Esperanto-instruado kaj kiel gvidanto de la Internacia (Cseh-)Instituto de Esperanto kaj multjara redaktoro de La Praktiko. Li estas ankaŭ membro de Akademio de Esperanto. — En 1930 li gvidis du grandajn kursojn en la Universitato de Oslo, kaj tiuj kursoj signifas la restarigon de la Esperanto-movado en nia lando.

Postfeste ni sincere gratulas!

Teodor Julin 85-jara

La konata sveda esperantisto, poŝtestro Teodor Julin, fariĝos 85-jara la 31an de oktobro. S-ro Julin estis i. a. prezidanto de la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo en 1934. En bona sano li partoprenis la Nordlandan Esperanto-Kongreson en Oslo en junio de la nuna jaro. — Nian sinceran gratulon al la jubileulo!

Kjell Gustavsen 50-jara

La nova vicprezidanto de N.E.L., Kjell Gustavsen, fariĝis 50-jara la 19an de majo. Li estis la afergvidanto de Esperantoforlaget 1952—1957 kaj multon faris por progresigi la eldonejon. 1960—1963 li estis prezidanto de Orienta Distrikto de N.E.L., kaj li

estis membro de la LKK de la Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo, junio 1965. Sed plej konata li estas kiel la ĉiam helpopreta homo, kiam temas pri Esperanta tasko, kaj kiel plej lerta kolektanto, ĉu temas pri subskriboj, ĉu pri mono aŭ aliaj aferoj. — Ni sincere gratulas postfeste!

Hans Nesje 80-jara

Konata esperantisto en Ålesund, Hans Nesje, fariĝis 80-jara la 3an de julio. Li estis prezidanto de la iama Esperantoklubo en Ålesund kaj restis fidela esperantisto ĝis nun.

Ni sincere gratulas al li postfeste!

Rolf Holm 50-jara

La multjara animo de la Esperantomovado en Norda Norvegujo, bankisto Rolf Holm en Tromsø, fariĝis 50-jara la 7an de aŭgusto. Li estas esperantisto de 1934. Dum multaj jaroj li estis delegito de UEA, prezidanto de la Esperantoklubo La Norda Lumo en Tromsø kaj fervora kursgvidanto. Li estas Kavaliro de la 2a klaso de Pro Merito.

Nian sinceran gratulon postfeste!

Oluf Olsen 75-jara

La multjara presisto kaj ekspedanto de Norvega Esperantisto, Oluf Olsen, fariĝis 75-jara la 14an de septembro. Oluf Olsen naskiĝis en Danujo, sed enmigris Norvegujon en 1911. Esperantisto li estas jam de 1907. Dum multaj jaroj li loĝis en Kristiansand S., kaj estis agema estrarano de la tiea Esperanto-klubo. Poste li transloĝiĝis al Oslo. Li estas Kavaliro de la 2a klaso de Pro Merito. Sincere ni gratulas al li okaze de lia jubileo!

Arne Høgseth 50-jara

Arne Høgseth, Tromsø, fariĝos 50-jara la 19an de oktobro. Li estas esperantisto de 1934, kaj dum ĉiuj

jaroj li estis unu el la gvidaj fortoj de la Esperanto-movado en Tromsø, i. a. li estas prezidanto de la ekzamena komitato de Tromsø. Li ankaŭ gvidis kursojn. Li estas kavaliro de la 2a klaso de Pro Merito. — Ni sincere gratulas al li pri la jubileo!

Bjørn Ottesen 50-jara jubilanto

En septembro s-ro Bjørn Ottesen festis sian 50-jaran jubileon kiel esperantisto. La 15an de septembro 1915 li komencis partopreni en Esperanto-kurso, kaj jam la 28an de novembro 1916 li fariĝis la unua prezidanto de la novfondita «Klubo Esperantista» en Oslo. Dum multaj jaroj li gvidis la klubon tre lerte kaj estis ŝatata de ĉiuj membroj. Dum lia tempo kiel prezidanto la klubo travivis unu el siaj plej bonaj epokoj. Lia fantazio estis nepriskribebbla kaj la programoj multspecaj — kaj interesaj kaj amuzaj. Ke la membroj estis kontentaj kaj dankaj estas nediskuteble, ĉar neniam la partopreno estis tion grandskala, kaj nur malofte okazis ke membro forestis.

Ĉar mi estis lia kunlaboranto dum multaj jaroj, mi uzas la okazon danki lin pro la ĉiama bona kunlaborado.

Aagot Sletterød.

Instituto por Oficialigo de Esperanto (I.O.E.) fondita

86 esperantistoj el 22 landoj fondis internacian institucion kun la nomo *Instituto por Oficialigo de Esperanto*. Provizora sidejo: 13 rue de la *Reinette*, Bruselo, Belgujo.

La celo de IOE estas per kampanjo de koncentrigita, kaj samtempe ĉiufanka agado krei la bezonon de la lernado de Esperanto per ĝia enkonduko en ĉiujn fakojn de la homa aktiveco, kie internacia kontakto regule

okazadas, kaj tiel atingi la oficialigon de la Internacia Lingvo.

Ĉiu fako havas sian propran organizaĵon kaj agas sub la gvidado de aparta fakestro. La kunlaborantoj agantaj en unu lando povas esti organizitaj kaj agi sub la gvido de Landa Komitato de IOE.

La direkcio konsistas el Direktoro, necesa nombro da Vicdirektoroj, Ĝenerala Sekretario, Centra Stabo kaj Membroj de la Direkcio.

Laŭbezone IOE organizos internaciajn kunvenojn de siaj kunlaborantoj kaj de fakuloj ĝenerale, seminariojn kaj reciprokajn vizitojn. Ĝi ankaŭ eldonos specialigitajn lernolibrojn, vortarojn, terminarojn kaj aliajn presajojn, kiuj povos kontribui al la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon.

La unua Direkcio konsistas el jenaj personoj: direktoro: Lic. Tibor Sekelj, Beogrado; vicdirektoroj: Gian Carlo Fighiera, Bruselo, Lic. Carl Støp-Bowitz, Oslo, Mark Starr, Novjorko, Liem Tjong Hje, Semarango (Indonezio) kaj Henri Rousseau, Dakaro (Senegalo); ĝenerala sekretario: Antonije Sekelj, Beogrado; membr. de la direkcio: Jean Dettwiller (Francujo), fino Thérèse van den Reijen (Nederland), Luis Romania (Britujo), Sokratis Sakelloropoulos (Greklando), Ernesto Sonnenfeld (Urugv.) Manfred Führer (Svislando) — kaj pluaj 8 elektitaj kiuj ankoraŭ ne konfirmis la akcepton de la funkcio.

La provizora adreso de IOE estas ĉe s-ro Fighiera. Tamen por proponi kunlaboron aŭ pri ĝeneralaj temoj bonvolu ĝis plua informo korespondi kun la ĝenerala sekretario, A. Sekelj, Kondina 24, Beograd, Jugoslavio.

Estas dezirataj ankoraŭ multaj kunlaborantoj, speciale por turismo, sporto kaj sciencoj (en turismon oni kalkulu ankaŭ PTT, trafikon, doganajn, hotelojn, restoraciojn ktp.).

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista de Oslo.

31/5. La prez. John Berggreen bonvenigis la ĉeestantojn kaj precipe la eksterlandajn gastojn, nome Emilija Lapenna el Zagreb, Jugoslavio, Ethel Solhauge, Danio, Margret Breiholtz, Germanio kaj Calvin C. Cope el Usono, kaj petis ilin transdoni niajn salutojn al iliaj kluboj.

La ĉefpunkto de la programo estis lumbildprelego de Emilija Lapenna. Unue ŝi salutis de sia klubo «Bude Borian», la plej granda el la 5 kluboj en Zagreb. Ŝi rakontis pri la Esperantomovado en Jugoslavio, pri la lando kaj ĝia trista historio — 400 jaroj sub turka jugo. Ŝi ankaŭ rakontis pri Primošten, kie Esperantistaj junuloj fondis kampadejon en tre bela loko ĉe la bordo de la Adriatiko. S-ino Lapenna ankaŭ montris serion da tre belaj kolorlumbildoj. La prelego estis prezentata en modela treege bela Esperanto, kaj la ĉeestantoj per forta aplaŭdo montris ke ili vere ĝuis la prelegon kaj la bildojn.

Dum la kafopaŭzo la 48 ĉeestantoj vigle interbabilis.

Ekskurso al Oksval, Nesodden, 9/6.

Komencas esti tradicio ke la junia klubkunveno okazas en la somerdomo de Eva kaj Carl Støp-Bowitz, kiuj afable invitis la klubanojn pasigi agrablan somervesperon tie.

Post la bonvenigo de la prez. John Berggreen, C. Støp-Bowitz disdonis ekzamenajn diplomojn al jenaj kiuj plenumis elementan ekzamenon: Tore Haug, J. H. Selstad, Frank Aasheim.

C. Støp-Bowitz dankis ilin pri ilia intereso kaj substrekis la signifon de la ekzamenoj — por la unuopaj esperantistoj kaj por la movado ĝenerale.

La ekzamenoj atestas pri la lingva nivelo de la membroj, kaj atesto pri kono de nia lingvo ankaŭ povas esti pluso kiam oni serĉas oficojn.

La ĉefpunkto de la programo estis raportoj pri la Fervojoista Esperanto-Kongreso en Hamar 22.—28/5. Støp-Bowitz rakontis pri solena malfermo, dum kiu li faris la festparoladon. — Rolf Bugge-Paulsen rakontis pri la inaŭguro de la Esperanto-strato en Elverum, dum kiu la Televido ĉeestis.

Nia «Prestro» Tor Magnus Carlsen distris nin per «Trønderskrøner», kaj Otto Prytz legis 2 humurajn rakontojn el Norda Norvegio verkitajn de A. Dybwad. Ambaŭ aktoroj sukcesis vigligi la ridmuskolojn de la membroj kaj la forta aplaŭdo montris ke la ĉeestantoj alte taksis la programopunkton. — Post la kafopaŭzo ni iris al la ludejo kie ni dancis laŭ akompano de C. Støp-Bowitz per tirharmoniko. — La tre sukcesan ekskurson ĉeestis 35 personoj. La vetero estis brila.

La Esperantoklubo de Bergen

kunvenis la 6an de majo ĉe Nelly Bjørge Nilsen. La prez. gvidis. S-ino Hartwigsen legis bergenajn anekdotojn «Malgaja tago» kaj «Ĉe la kuracisto». La sekr. parolis pri la aranĝo de Okc. Distrikto en Hogganvik, kaj li verkis kanton pri la vojaĝo kaj restado tie, kiun ni unisone kantis.

La prez. riferis leterojn, i. a. pri la Nordlanda Kongreso en Oslo, kaj la Landa Kunveno de NEL kaj informis pri tiuj aranĝoj

Kelkaj membroj ekhavis kaj riferis leterojn de eksterlandaj samideanoj, kiuj ĉisomere vizitos nian urbon. Ni pritraktis la aferon kaj faris preparojn tiurilate. — La prez. fine donis festkunvenajn informojn.

*

Festludkunveno okazis la 20an de majo. «La vortoj de la monato»n pre-

zentis Thora Horntvedt, kiu legis «Nun estas tago». Poste ŝi plane ludis «Verdiĝas la deklivoj», kaj ni unisone kantis. — Post kiam la sekr. legis referaĵon de la antaŭa kunveno, li kiel redaktoro prezentis la klubgazeton. Tiu enhavis poemon de Nordal Grieg, tradukita de K. Offerdal kaj artikolojn pri festotago en la monto kaj pri turismo. — La prez. informis pri ekskurso ien (en la bluan), kiun la klubo aranĝis la ĉielira tago.

Post la kafopaŭzo ni partoprenis muzikan distraĵon. Ĉiuj ĉeestantoj ekhavis instrumentojn, kaj ni aranĝis grandan orkestron, kaj gajaj ludis kaj kantis ĝis la fino de la kunvenvespero. Majken Wagle Jørgensen pi-
ane akompanis.

Korespondu!

Inĝeniero Jiri Tvrdík, Albrechtice u Ĉ.T. 6/2, Okr. Karviná, ĈSR.

Mi dez. kor. kun norvegoj, kiuj interesiĝas pri naturscienco, geografio, etnologio aŭ lingvistiko. S.ro Lubomir Streda, mestské muzeum, Nový Byd-
zov, okres Hradec Králové, Ĉeĥoslo-
vakujo.

Mi tre dez. korespondi kun norveg-
aj gesamideanoj. S.ro Hrdina Pavel,
Vracovice 23, p. p. Zdislavice, okres
Benešov, Ĉeĥoslovakujo.

Prezidantino de Esperanto-klubo,
mezaĝulino, dez. kor. kaj interŝanĝi
pensojn kaj spertojn. Danuta Kubiak,
Mickiewicza 47, Starachowice, Pol-
lando.

Mi dez. kor. kun norvegoj. Gunna
Saratlijska, ul. Rartowski 133, Sofia,
Bulgarujo.

Kolor. pk. el Norvegujo dez. inter-
ŝanĝi por ekspoziciaj celoj s.ro D.
Bartošik, Fr. Šramka 31, Praha 5 —
Smichov, Ĉeĥoslovakujo. Preferas ri-
cevi plurajn pecojn samtempe. Re-
kompenco laŭdezire. Ankaŭ uzitajn!»

Fremdlingva sekretariino 23-jara,
f.ino Margret Breiholz, 2351 Armstedt,
Post Brokstedt bei Hamburg, Germ.,
dez. kor. kun sinjoro.

En nia urbeto ekzistas esperantista
rondeto «Amikoj de Norvegujo», kun
18 membroj. Ni malmulte konas vian
landon, sed tre deziras informojn. Ti-
al ni deziras korespondi kun genor-
vegoj. Skribu al «Amikoj de Norveg-
ujo», s.ro Zdzislaw Nosovski, Nieszków
51, pta. Ziebice, Pollando.

Mi serĉas korespondadon kun seri-
oza filatelisto norvega. D.ro A. Wen-
clewski, ul. Wojskowa 13/3, Poznan,
Pollando.

Dez. kor. s.ro G. Selhorst, *Schoorl*,
Nederlando.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 72 7